# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 17. – REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT. – Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstr. 22
Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12

Gek-doj partoprenontaj la Londonan Kongreson, ne forgesu viziti la fakkunvenon de la liberpensuloj. Proponojn k dezirojn faru tuj al nia sekretario.

## ESTU KONSEKVENCA!

En fino de la jaro 1928 la konata pentristo-artisto Georgo Gros *(Grosz)* estis akuzita pro blasfemo. Li estis publikiginta 17 desegnojn titolitajn "Hintergrund. 17 Zeichnungen für die Aufführung des Schwejk in der Piscatorbühne" (Fundo. 17 desegnoj por la prezentado de "Ŝvajk" en la Piskator-scenejo). Pro tri el la 17 desegnoj la prokuroro faris kontraŭ li proceson. La ĉi apuda bildo, unu el la cenzuritaj bildoj (n-o 9), prezentas "la elverŝon de la sankta spirito".

Ĉi tie mi ne volas priparoli la sencon k la plenumon de la bildoj. Ili estas trafaj k mi jam ofte vidis kopiojn de la bildoj dum liberpensulaj manifestacioj sur stratoj k en kunvenoj. Ni ŝatas tiajn artistojn batalantajn per sia arto kontraŭ la hipokrituloj.

Sed mi devas mallaŭdi la sintenadon de Gros; ĉar, malgraŭ ke li per sia arto kontraŭbatalas la eklezion, li persone ankoraŭ estas membro de la protestanta eklezio, sekve li morale k mone subtenas institucion, kiun li malestimigas. Gros deklaris antaŭ la juĝistaro je la demando, ĉu li estas membro de iu eklezio aŭ ĉu li interne aŭ formale estas libera de ĝi: "Membro de iu destinata eklezio interne mi ne estas." Prezidanto: "Ĉu vi estas formale ankoraŭ membro?" (Gros: "Jes.") "Kaj al kiu eklezio vi apartenas?" Gros: "Al la protestanta."

Jen ni havas la salaton. Unuflanke li forte kontraŭbatalas la eklezion, aliflanke li subtenas ĝin eĉ mone per sia membreco. Estas disharmonio ĉe li inter pensado k agado. Li sekve nur estas spritulo. Kaj la ekleziuloj ridas kaŝe. Homo, kiu ne agas, kiel li pensas, estas malkonsekvenca; li kastras sin spirite.

*K. H.*

## ATEISTA MOVADO EN BARNAŬLO (SOVETIO)

La laboristoj de l' urbo Barnaŭlo same kiel laboristoj en aliaj urboj de USSR, havas grandan celadon al scienco. La socikultura agado bezonas multe da ejoj por kluboj, bibliotekoj, kinematografejoj, diversaj kurs-lernejoj por laboristoj ktp., sed la necesaj domoj por kultur-oficejoj ne sufiĉas, ĉar la kreskado de l' kulturmovado antaŭvenas konstruadon de domoj por kulturaj oficejoj. Samtempe en Barnaŭlo estas dek preĝejoj, bonegaj domoj, okupitaj de l' eklezio. En ĉiuj preĝejoj partoprenas diservadon po unu — du dekoj da ekleziano j. Konsiderante tiun situacion, la gelaboristoj pasintjare komencis postuli de l' urba soveto fermigon al kvin preĝejoj, sed ĝis nun estas fermita nur unu



sola, en kiu nun troviĝas bona klubo por ruĝarmeanoj.

Dum nuna jaro la Barnaŭla Konsilantaro de Sendiuloj (ateistoj) en pli ol 200 diversaj kunvenoj de gelaboristoj raportis "pri socialisma konstruado k malhelpo de religio". Ĉiuj kunvenoj rezoluciis postuli de la urba soveto k distriktestraro la permeson: demeti sonorilojn por transdoni ilin al la industrio, kiel valoran necesan metalon; same la kunvenintoj postulis de l' urba k distrikta administracio fermi la preĝejojn.

Ĉar la administracio malrapidis plenumi la postulon de l' laboristaj kunvenoj, la Barnaŭla societo de ateistoj turnis sin al ĉiuj urbanoj k enpresis en loka jurnalo la peton, ke ĉiuj Barnaŭlanoj voĉdonu por la aprobo aŭ malaprobo de la jus nomitaj postuloj laboristaj. En Barnaŭlo estas 36 mil loĝantoj, kiuj rajtas partopreni en elektoj de l' Urba Soveto. (Rajtas partopreni en elektado al urba soveto k voĉdoni ĉiuj gelaboristoj, geoficistoj, gekamparanoj senescepte, personoj de liberaj profesioj. Senrajtigitaj estas: privatkomercistoj, eks-estroj de polico k ĝendarmoj, eks-militestroj, ekspluatistoj, pastroj, alivorte ĉiuj, kiuj ne volas labori, sed volas aŭ volus suĉi sangon el la laboruloj.)

Ĝis nun jam partoprenis en la voĉdonado 24 310 personoj. El ili 23 919 personoj postulis tuj demeti la sonorilojn k fermi la preĝejojn por diservado, sed malfermi ilin kiel kulturoficejojn. Nur 391 personoj deklaris, ke ili volas preĝi k protestas kontraŭ fermiĝo de preĝejoj. Inter la 391 personoj estas preskaŭ ĉiuj gemaljunuloj, kiuj havas aĝon de 56 jaroj k pli, maljunulinoj estas 260.

La voĉdonado ankoraŭ daŭras, tamen oni ne dubas, ke granda parto da laboruloj ne plu volas preĝi, ne volas aŭskulti la sonojn de sonoriloj. La laborularo estas ne konsentema, ke 52 mil kilogr. da valora metalo senutile pendu en aero sur Barnaŭlaj preĝejoj. La gelaboristoj devigos la urban soveton (urbadministracion) plenumi siajn postulojn: transdoni al la industrio ĉiujn sonorilojn, fermi ne malpli ol kvin preĝejojn k organizi kultur-oficejojn en estintaj preĝejoj.

Ne miskomprenu la kondiĉojn de l' ateista movado en Barnaŭlo. Neniu malpermesas al eklezianoj diservi; ĉiu, kiu volas, ĉu li estas laboristo, ĉu kamparano, ĉu oficisto aŭ mallaborulo, senriske povas viziti preĝejon k dipreĝi, sed dank' al granda kleriglaboro de l' kultur-oficejoj granda parto da laboruloj en USSR jam liberiĝis el la religia opio; ili jam ne plu kredas al pastroj k ne volas esti kiel "diaj ŝafaĉoj", kiuj ne scias, kien ili iras aŭ kien gvidas ilin la pastroj. Tio estas la kaŭzoj pri la kontraŭdiaj postuloj de l' gelaboristoj.

*Kompil-verkis A. Kuliĉenko (12.876).*

Ĵus aperis! JACK LONDON
LA FERA KALKANUMO
Tradukita el la angla de G. Saville.
368 paĝoj. Formato 12×18 cm.
Prezo 2,60 mk. g., (bindita 3,20 mk. g.)
Mendu tuj ĉe Administracio de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O 27, aŭ Sidejo de SAT, 23, rue Boyer, Paris XX.